
Turangia Luko 28

4-a trimestro 2012



80-jaraj leteroj (sekvo)

Historiaj eventoj

En tiu numero vi legos..

El la leteroj de Emile Bézier, J Gaumé eltiris frazojn, kiuj temas pri historiaj eventoj.	p.1 ĝis p.4
D. Le Brizault prezentis "la unuan renesancon en Tours", okaze de la lasta Zamenhofa Festo.	p.4 ĝis p.7
Ĉu vi konas la pîĵamon de la jaro 2000 ? J. Gaumé rakontas.	p.7 p.8
André Aude memoras amuzaĵon, kiu okazis dum la IFEF kongreso de Zurich.	p. 8
Solvo de la krucvortoj proponitaj de B. Turbillon en la Turangîa Luko n° 27.	p. 8

Mi ankaŭ de longe deziras germanan korespondanton por la samaj kialoj ol vi, ĉar se la germanaj nacionalistoj ne amas nin, en Francio la faŝistoj tentas la junularon al la malamo de la germanoj. Tio estas granda eraro kę la popoloj devus eviti se ili volus serĉi kompreni la kialon de tiu malamo kiu favoras la kapitalistoj de la du landoj.

Bedaŭrinde mi batalis dum la tutmonda milito, sed mi petas vin kredi, kę neniam mi ofendis militkaptitoj germanaj kaj neniam mi ŝtelis de ili aĵojn kiel memorigaĵoj.

La malĝojan memoron, kę mi havas de la milito kuŝas en mia koro, kaj mi faros ĉion, en la kapableco de miaj malgrandaj rimedoj, por ebligi la repacigon inter ĉiuj popoloj, kaj precipe inter Germanujo kaj Francio.

En Francio ĵus fondiĝis nova partio, sama la la Hitlera partio en Germanujo. La nacionalista deputato Tetinĵer (Taittinger) estas la fondanto.

Ni esperu kę li neniam atingos la regan potencon, ĉar tio estas granda malfelicô por ĉiuj. Sed mi ne kredas kę en Francio la laboristaro elektos volonte tiun ĉi partion, kiu pensas por la milito kaj kies laboristoj suferas la malagrablaĵojn. (W, 4-11-30)

La 11-an de Novembro okazis feston je la datreveno de la haltbatalo, sed en Tours malmulte da homoj partoprenis. Tamen la ŝovinistoj parade marŝis kun ĉiuj siaj medaloj sur la brusto, sed la laboristoj ne estas nombraj inter ili, krom la katolikuloj, ĉar tie ĉi la plimulto estas socialistoj.

La urbodomo apartenas al nia partio, la tuta magistrato estas socialista, kaj la urbestro estas parlamentano (deputito). Tiu estas laboristo (metalfandisto) tre bona por ĉiuj kaj precipe justo.

Mi dankas vin por la signo de la datreveno de la germana revolucio. (W, 16-11-30)

Momente en Francio multe da bankoj bankrotas, unu precipe, kies ŝuldaro estas proksimume 1235000000 da frankoj, ĝi nomiĝas la banko Ustrik (Oustric). La parlamentaro diskutis pri tio kaj Raŭl Père (Raoul Perret) Ĵusteca ministro estis obligita rezigni ĉar li protektis la bankon, cetere aliaj parlamentanoj protektas ĝin ankaŭ.

Vidante la publikan opinion, la

registaro elekţis komision konsistante el 33 membroj por klarigi la aferon (sed estas certa kę ili nenion trovos por kulpigi la estraron).

Bedaŭre multe da personoj estas trafitaj de la bankroto de la banko Ustrik, kaj la plimulto estas iomete riĉa.

Ĉiutage unu banko fermas ĝiajn gicetojn. Jen estas kie kondukas la burĝa reĝimo. Eble tio malfermos la okulojn de la homoj. (W, 28-11-30)

Tiel kiel mi antaŭvidigis al vi, la ministraro Tardieu estas falita pro la afero Oustric, post baloto de la Senato.

La politikistoj ne povas formi ministraro ĉar la plimulto inter ili estas pli kaj malpli implikitaj en tiu ĉi afero, tiam ! Se la aĵoj daŭras eble la republika prezidanto dissolvos la parlementaron. Ni atendu ! (W, 12-12-30)

Nun la senlaboreco kreskas en Francio, precipe en la aŭtomobila industrio, la gazetaro nenion skribas pri tio, sed en la sindikatoj oni estas pli bone informita kaj mi klopodas por mone helpi la senlaborulojn. Efektive tio ne estas senlaboreco, sed la fabrikposedantoj maldungas la laboristojn, dum tri semajnoj aŭ unu monato, kaj poste redungas ilin, por pli malalta salajro ĉar bedaŭrinde multe da inter ili ne estas sindikataj. Tial la sindikatoj ne estas sufiĉe fortaj por neebligi tion. (W, 8-1-31)

Mi estas tre konsternata … via amikino estas maldungita, tio estas tre enua por vi, precipe kę vi estas senlaboro kaj mi opinias kę la monhelpo de la germana ŝtato ne estas sufiĉa por dece vivi. (W, 18-1-31)

Bedaŭrinde, en Francio, la virinoj ne sin interesas pri Esperanto, kaj tre malmulte sin okupas pri politiko ; laŭ mia opinio, ili ne pravas, ĉar mi opinias, kę la virino havas la samajn rajtojn kiel la viroj, do ŝi havas la samajn devojn.
Ŝi devas sin okupi pri la aferoj de la lando.
Ŝi devas instrui la infanojn, (kiam ŝi estas patrino), pri la malamo de la milito, kaj klarigi al ili la amon de la proksimulo.
Jen estas kara kamaradino Linda, kiel mi komprenas, kaj mia edzino komprenas tiel kiel mi, kę oni devas eduki la infanojn, sed pro tio la virino devas helpi la viron, ĉar ŝi estas pli milda ol la viro, kaj la infano pli volonte obeas sian patrinon.

Bedaŭrinde, multaj virinoj sin okupas pli, pri tualeto ol pri la politiko kaj edukado de la infanoj. Tamen estas en la edukado de la infano kę kuŝas la estonteco de la proletaro. (L, 25-3-31)

Mi estas tre kontenta kę vi ricevas plue la subvencion, sed kion oni devas deziri, tio estas pli bonaj ekonomikaj kondiĉojn, sed bedaŭre mi timas kę oni atendos ankoraŭ longe, ĉar en ĉiuj landoj la mastroj volas malaltigi la salajrojn, jam ĉe la ministoj la miniaj kompanioj provis tion, sed antaŭ strika minaco ili prokrastis la salajran malaltigon sed en ĉiuj malgrandaj industrioj multaj inter ili malaltigis la salarojn, aŭ tiam la laboristoj nur laboras 5 tagoj semajne. Ĉio tio estas tre malgaja por la laboristoj kaj ni devas deziri kę baldaŭ la socialismo faligu la kapitalismon por helpi la laboristojn vivi komforte kaj ne plu timi estontecon ; (W, 28-3-31)

Ĉiufoje kiam mi legis, aŭ vidis en kinejo militaĵojn, mi sentas sopiron ŝveligi mian koron pensante al miaj amikoj, kiuj estas mortpafitaj dum la tutmonda milito. Ankaŭ mi pensas al ĉiuj malfeliĉuloj mortigitaj dum la milito, por kaj pro la kapitalismo, kaj mi opinias nian devon klarigi al la infanoj kaj ankaŭ la junuloj, kial oni devas malami la militon kaj ankaŭ sian kaŭzon : la Kapitalismo.

Ni deziru kę neniam okazos ankoraŭ tia terura aĵo kaj kę iom post iom la homoj komprenu kę ili estas fratoj, sed la vojo estas ankoraŭ longa. (W, 20-4-31)

Mi dankas vin por via letero, per ĝi mi estas tre feliĉa scii kę en Germanio mi havas kamaradinon, kiu konas ŝiajn klasdevojn, kaj kiu estas anino de la socialdemokrata partio kaj de la sindikato. Se ĉiuj virinoj komprenus, tiel kiel vi, kę ili devas esti flankę de la viroj por helpi ilin batali por havi pli bonan situacion kaj ankaŭ pli bonaj vivrimedojn, la nuna ekonomieco ne ekzistus.

Bedaŭre, tra la mondo, nemultaj estas la virinoj, kiuj batalas kun ni. Nun pri via laboro,

mi opinias ĝin tre laciga, kaj tio devas laci multe la okulojn, labori la tutan tagon en malhelaj ĉambregoj. Ĉu vi havas sufiĉan salajron por tia laboro ? (L, 26-4-31)

Ni parolu iom, pri la unua de Majo :

En Francio ĝenerale nenio grava okazis. La komunista partio admonis strikon devinta daŭri 1 horon, en ĉiuj laborejoj, sed ĝi ne sukcesis, ĉar la gelaboristoj scias bone kę nun (pro la kęskanta senlaboreco) oni ne povas organizi grandan demonstracion, ĉar la patronoj rapide maldungos la manifestantojn, ili profitos la okazon por fermi, dum kelkaj tagoj, siajn fabrikojn, kaj poste ili redungos la laboristojn sed donante malplialtan salajron.

En Tours la socialista partio organizis kunvenon sed por kę la komunistoj ne ĝenas nin dum la kunveno, oni, por ĉeesti la kunvenon, devis montri ,enirinte, la membrkarton de la socialista Sindikato, tiel ni estis trankvilaj. (W, 7-5-31)

Via lasta letero ricevita depost jam kelkaj tagoj feliĉigis multe min, ĉar ĝi sciigis al mi, kę vi denove laboras, kaj mi opinias vi ankaŭ devas esti feliĉa, ĉar tiel, vi certe havos pli da mono ol per la ŝtata asekuro. (W, 7-5-31)

Nun mi devas diri al vi, kę mi aĉetis fotoaparaton fabrikatan en Germanio : en Dresden ĉe Zeiss-Ikon ; sendube vi konas ĉi tian firmaon, ĉar ĝi estas tre konata kaj bonreputacia tra la mondo.

Eble estas ĉe Zeiss kę vi laboras ?(L, 15-6-31)

Do, laŭ via letero, vi estas ankoraŭ senlabora, kiom tio estas bedaŭrinda. (W, 6-10-31)

Via feliĉo estus tute kompleta, se vi havus laboron, sed bedaŭre, la internaciaj aferoj ne lasas antaŭvidi pli bonan situacion por la laboristoj. (W, 31-10-31)

Mi legis en ĵurnalo kę la riverego Elbe elfluiĝis kaj surakvigis multajn urbojn kaj vilaĝojn ; kę en Germanio la plimulto el la riveregoj tiel faris kaj multe difektis diversajn provincojn. Ĉu en Dresdeno multe da damaĝoj okazis ? (W, 18-1-32)

Kaj vi kara Walter, ĉu vi ĉiam estas senlabora ? Ĉu vi ĉiam ricevas la ŝtatsubvencion ? Kiam do vi havos daŭran laboron ? (W, 1-2-32)

Hieraŭ mi legis en mia socialista jurnalo « La Popolo » kę la ĉefsekretario de nia franca socialista partio trairis germanion, invitata de la social demokrata partio.

Li paroladis en diferentaj kunvenoj okazintaj en : Kologno, Brême, Berlino kaj ankaŭ en Dresdeno.

Ĉu vi ĉeestis la Dresdenan kunvenon kie paroladis mia samlandano.

Vere Paŭlo For (Paul Faure) (Jen estas lia nomo) estas bona oratoro kaj fervora socialisto, li estas deputato, kaj grandega estas lia reputacio en la laboristaj medioj, en mia lando.

La francaj kapitalistoj lin timegas, ĉar li estas tre amata de la popolamasoj. Ankaŭ, li estas bonkora, ĉiam preta helpi siajn proksimulojn. La francaj senlaboruloj al li devas multe, ĉar li estas unu el iliaj plej viglaj defendantoj. (W, 1-2-32)

De kiam mi skribis al vi gravaj okazintaĵoj okazis, inter ili la elekto de la prezidento de la germana respubliko. Kun feliĉo mi konstatas, kę malgraŭ la mizerego en kiu estas la germana popolo ĝi ne volas Hitler kiel prezidenton, kaj mi esperas kę hodiaŭ Hitler estas tute venkata. Ne volante Hitler la germana popolo pravas, ĉar kun Hitler, certe estus la milito post nelonge, kaj ankaŭ estus la morto de la laborista movado, ĉar la industriestroj de li subtenataj klopodus, penus por malpermesi kaj neigi la sindikatojn kaj aliajn laboristajn organizaĵojn.(L, 10-4-32)

De post la sendo de mia lasta letero, gravaj okazintaĵoj okazis. Mi aludas pri la elekto de la germana prezidento. En Francio oni ĝojis multe kę Hitler ne estis elektata, ĉar oni opiniis kę se li estus elektita la milito, post nelonge, estus certaĵo, sed feliĉe la Germanoj tion komprenis. Ankaŭ ili komprenis, kę Hitler kiel prezidento, tio estus la fino de la laborista movado, ĉar kompreneble li estus subtenanta la kapitalistojn kaj la industriestrojn, kiuj al li donas monon por plifortigi lian movadon.

Hodiaŭ mi legis en mia ĵurnalo la rezultojn pri la germanaj elektoj, kaj laŭ mia ĵurnalo sendube Braun kaj Severing daŭrigos la regadon.

(W, 26-4-32)

Nun en Francio oni multe batalas, propagandas por la venonta balotelekto, kiu okazas la 1an de Majo por elekti deputatoj al la Parlamento. Ni esperas, ke la socialista partio gajnos vocojn kaj havos kelkajn deputatojn plie. Kio antaŭvidigas tion al ni estas la nuna situacio, kiun lasas la nuna registaro, tiu situacio estas tre gravega.

La mono mankas en la ŝtatkasoj, kaj la ioma mono, kiun oni havas, oni elspezas ĝin por konstrui fortikaĵojn ĉirkaŭ la orienta landlimo, por konstrui ankaŭ : kirasŝipojn, submarŝipojn, sed por asekuri la laboristojn senlaborantajn, konstrui lernejojn, malsanulejojn, monon oni ne havas ; tiu situacio malfermas la okulojn al multe da homoj kaj tiel okazas tiaokaze, estas ili, kiuj estas la plej viglaj, kaj kriantaj por fuŝi la kunvenojn organizatajn de la burĝaj kandidatoj. Eĉ en kunveno okazinta en mia kvartalo, la burĝa kandidato ne povis paroli, kiam li malfermis la buŝon por ekparoli, tuj li estis silentigita de la ĉeestantoj. (W, 26-4-32)

Ne estas ke mi timis, ke vi ne plu emis korespondadi kun mi, ne, tion mi ne kredis, sed mi scias ke du gravaj okazintaĵoj okazis en Germanio, kaj militanta laboristo, kiu partoprenas la vivon de multaj laboristorganizoj, ne havas tro de tempo por efike lukti kontraŭ la faŝismo.

Sed laŭ la lastaj forpasintaj semajnoj, ni povas konstati, ke la Hitleranaro ne plu kreskas eĉ oni povas diri, ĝi atingis eĉ preterpasis ĝian plej grandan potencon, kaj nun estas videble ke iom post iom ĝi malkreskos, sed ĝia malkresko oni devas precipe al la organizata laboristaro, interalie la Fera Fronto, kies mi havas insignon senditan de mia kamaradino Linda. (W, 11-9-32)

Mi legis en mia ĵurnalo, ke en Dresden, novan politikan partion oni kreis, ĝia nomo estas : Socialista Laborista Partio Germana. La redaktorestro de ĝia ĵurnalo estas Sinjoro Arno Franke, el dresdeno. Ĉu vi kredas ke ĝi kreskos ? (W, 11-9-32)

En Francio, ne multe da novaĵoj okazis ĝis nun. Ni atendas, kun intereso la respondon de la Franca registaro, al la raporto sendita de la germana registaro pri la rearmado de germanio. Fakte la Germana peto estas justa, ĉar mia opinie, germanio rajtas havi armeon tiel fortikan kiel tiu de Francio, sed malgraŭ tio, ni socialistoj francaj kaj germanoj, devas kontraŭbatali tion, kaj ni devas penadi por ebligi tutmondan malarmadon, sed mi opinias ke tio postulas longan tempon. (W, 11-9-32)

Mi legis en mia ĵurnalo ke la 6a de venonta novembro okazos en Germanio elektoj por elekti deputatojn, laŭ mia laborista gazetaro certe la Hitlera partio perdas voĉojn, sed ke malgraŭ tio, la nova parlamento ne povas havi iu ajn plimulton parlementon ĉar la diferencaj partioj kontraŭiĝos unuj la aliajn. (L, 24-10-32)

Jacques Gaumé

TOURS
LA UNUA RENESANCO

En Tours, la jardekoj ĉirkaŭ 1500, estas konsiderataj kiel la ora aĝo rilate la artojn.

Tiam estis proksimume 15000 loĝantoj en la urbo ĉirkaŭ 2 centroj : la katedralo St Gatien, kaj la baziliko St Martin. Dum tiu periodo instaliĝis multaj metiistoj : juvelistoj, oraĵistoj, brodistoj, armilistoj, metiistoj pri la silko, kiuj konkurencis tiujn de Lyon.

Por kompreni la disvolviĝon de la artoj, memoru la reĝajn restadojn en la Luara valo : ekde 1418 Charles VII kaj Louis XI en Tours, Charles VIII en Amboise, Louis XII en Blois ĝis 1528 kiam François I revenis en Parizo.


En Tours la reĝo loĝis en la kastelo Le Plessis (La Riche apud la priorejo St Cosme). Sed riĉaj personoj de la kortego loĝis en Tours mem, kaj ofte estis komanditantoj de artaĵoj.

Mia celo estas unue serĉi en la centro de Tours spurojn de Renesanco, malgraŭ la gravaj detruoj dum la 2a mondmilito.


Jen kelkaj ekzemploj ĉefe de la unua Renesanco.

1.Religia arkitekturo

Katedralo : en tiu epoko, la 2 turoj estis konstruataj. Ili plibeligas la flamstilan fasadon, pere de la belaj Renesancaj kupoloj

Preĝejo St Symphorien (Kvartalo P. Bert) : ni povas ankaŭ admiri la fasadon, ĉefe la kasonojn en la ornamentaĵo de la itala stilo.




2.Laika arkitekturo

Vastaj kaj luksaj domoj, posedaĵoj de nobeloj aŭ riĉaj burĝoj :

Hotelo de Beaune : Jacques de Beaune, kiel plej grava financisto de Renesanco konstruigis ĝin en 1518. Bedaŭrinde ĝi brulis en 1940. Nur la norda alo postrestas. Meze de la ĝardeno, ni povas admiri la fontanon konstruitan de Bastien kaj Martin François, nevoj de la turanĝiano, Michel Colombe.




Hotelo Gouin : konstruita dum la XV-a jarcento. La fasado estis plibeligita per renesanca loĝio dum la XVI-a.





Placo Plumereau : ankaŭ pluraj domoj de la XV-a jarcento.



3.Skulptaĵoj

Promenante en la publika ĝardeno François Sicard, ni vidas la statuon de **Michel Colombe,** la plej konata kaj fama skulptisto, kiu havis atelieron ekde 1470 en Tours. Li skulptis por la reĝoj :



Tombejo de François II kaj Marguerite de Foix (Nantes, Katedralo St Pierre),



Tombejo de Louis XII kaj Anne de Bretagne (Baziliko St Denis, apud Parizo) skulptaĵoj el marmoro de Carrare…




4.Pentraĵoj

Mi elektas 3 pentristojn, la plej famajn el tiu epoko.


Jean FOUQUET ĉeestis en Tours ekde 1450, kiam li ĵus revenis el Italio. Li estis tre grava por la urbo. Li estis pentristo de la reĝoj, kaj ni povas admiri liajn pentraĵojn sur ligno, miniaturojn, iluminaĵojn.

Ekz : **Pieto**, pentraĵo sur ligno (1460 – 1480) videbla en la preĝejo de Nouans-les-Fontaines (1,46 m / 2,37 m)

Jean BOURDICHON : li renovigis la « librojn de horoj » ĉefe per prezentado de la personoj duonkorpe .



Ekz : **Bethsabée, sin banante** (horoj de Louis XII) (1498 – 1502) Pentraĵo sur pergameno (24,3 cm / 17 cm)



Ekz : **Triumfa eniro de Louis XII en Gênes**, Aprilo 1507. Detalo de miniaturo.

Ekz : **La Sankta Virgulino preĝanta**. Pentraĵo sur ligno, videbla en la Muzeo de Belaj Artoj de Tours, ekde 2007. Admiru la oran fundon kaj la riĉan lazuriton por la blua koloro de la mantelo.





Jean POYER : David kaj Urie (1500) la libro de horoj.



5. Muziko





Jean de OCKEGHEM : la plej fama muzikisto de tiu epoko. Li alvenis en Tours en 1451 kaj li estis la unua reĝa kapelestro ĝis sia morto en 1497. Li evoluigis la polifonion. Lia muziko estis laŭdita pro la kapableco veki emociojn. La nuna muzika grupo « Diabolus in Musica » ankoraŭ ludas liajn verkojn. Sur placo Châteauneuf estas halo dediĉata al muziko, nomata « Jean de Ockeghem ».

Finfine, jen statuo videbla apud la Luara kajo : Kiu estas tiu ?



Estas la famkonata verkisto, **François RABELAIS** (1483 – 1553). Tuj apud tiu statuo, troviĝas la beletra Universitato nomita « François Rabelais ».





Denise Le Brizault

La piĵamo de la jaro 2000

Kiam oni estas geavoj, la gefiloj petas kelkfoje ke oni vartu la nepojn. Jen kio okazis, kiam Petro kaj Maria vartis siajn genepojn en la jaro 2000 dum Julio.



Nikolao, kvinjara, kaj Luiza, trijara, pasigis la unuan tagon tre ĝentile.

Posttagmeze Petro promenigis siajn genepojn en la apuda arbaro dum Maria gladis tukojn, ĉemizojn kaj aliajn vestaĵojn.

Post la vespermanĝo, la avo iris akvumi la legomojn kaj la florojn en la vastan ĝardenon dum la avino legis historiojn por la du infanoj ĝis proksimume la naŭa.

- Antaŭ ol iri en la liton venu duŝi vin, ordonis la avino !

Kompreneble la infanoj ludis sub la akvo kaj Nikolao incitis sian fratinon, kiu kriis. Maria avertis :

- Bonvolu silenti, vi ŝiras miajn orelojn ! tuj liten !

Nikolao eniris sian dormoĉambron.

Avnjo akompanis Luizan ĝis ŝia dormoĉambro.

- Metu vian piĵamon !

- Mi volas iri en la liton nuda, diris Luiza, paĉjo kaj panjo faras tiel, paĉjo diras ke tio estas la

piĵamo de la jaro 2000.

Maria miris, sed por ne okazigi disputon, ŝi konsentis. Luiza restis nuda. Avnjo kisis tenere sian nepinon kaj iris en la ĉambron de Nikolao.

La infano estis jam en la lito. Maria rimarkis ke li ne havis manikojn sur siaj brakoj. Ŝi suprenlevis iomete la littukon.

- Vi estas nuda !

- Kompreneble avnjo, mi surmetis la piĵamon de la jaro 2000 ! paĉjo kaj panjo faras tiel.

- Jes, mi scias, Luiza jam diris tion.

La avino iris spekti televidan programon, ŝi ne restis longe, baldaŭ ŝiaj palpebroj fariĝis pezaj.

Ekstere preskaŭ noktis, avĉjo estis ankoraŭ en la ĝardeno.

Ŝi faris rapidan tualeton kaj iris en la dormoĉambron. Ŝi pensis : "mi devas ĝisdatigi min".

Kiam avĉjo revenis el la ĝardeno, li ne vidis la avinon sur ŝia brakseĝo kiel kutime. Li iris al la banejo, metis sian longan noktoĉemizon kaj eniris la ĉambron.

- Vi estas jam en la lito, ĉu vi estas malsana ?

- Ne, nur iom laca, la infanoj lacigas min.

- Avĉjo suprenlevis la littukon por eniri la liton. Li tuj rimarkis ke sia edzino estas nuda.

- Kio okazas Maria, ĉu vi freneziĝis ?

- Tute ne, mi nur surmetis la piĵamon de la jaro 2000.

- Diable ! Kial vi ne gladis ĝin ?

Jacques Gaumé

Kongresa amuzaĵo

Dum Majo 1952 aŭ 1953, okazis en Zurich la kongreso de IFEF (internacia fervojista esperanto federacio). Inter la kelkcentoj da partoprenantoj estis simpatia amiko de najbara lando, konata de ĉiuj, kun sia filino, junulino ĉirkaŭ 18jara. Ŝi akompanis la patron ne pro simpatio al Esperanto, sed por promeni.

Normale, ŝi ĉeestis la solenan malfermon apud sia patro, kaj aŭdis la kutimajn vortojn, tradicie abunde dissenditaj de la oficialaj salutantoj : "Esperanto estas la lingvo de la moderna homo" " la nuntempa homo devas koni Esperanton"...ktp... ktp. Ŝi forlasis la lokon kun la kapo plena de "homo", "homo".

Iam la patro deziris resti en la ĉambro por skribi salutkartojn, la knabino deziris promeni, do li diris : "se konato demandas vin kie troviĝas via patro, vi respondu : mia patro estas hejme".

Sed al la unua renkontita ŝi respondis : "mia patro estas homo".

- Jes, diris la demandinto, mi scias, ke via patro estas homo, sed kie li estas nun ?"

Obstine al li, kiel al ĉiuj la aliaj poste, ŝi respondis "mia patro estas homo… mia patro estas homo…"

Tio fariĝis la amuzaĵo de tiu kongreso.

André Aude

Aliĝu al la venonta kongreso de IFEF, kiu okazos samtempe kun tiu de Esperanto-France .



Solvo de la krucvortoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
A	T	R	O	P	O	■	P	R	I	E
B	O	■	B	R	■	R	A	S	P	I
C	■	O	T	E	■	A	R	■	S	■
Ĉ	P	R	E	T	E	R	I	R	I	S
D	E	■	N	E	K	■	Z	I	L	■
E	T	R	U	K	O	■	A	Z	O	T
F	E	■	■	S	L	E	N	■	N	A
G	G	R	O	T	O	■	O	B	O	L
Ĝ	A	B	R	O	G	O	J	■	■	I
H	S	■	O	N	I	■	N	U	L	O

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr